



*Estrara Komunikado EKO 2016-36 sendita el Budapeŝto, la 19an de decembro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun fontindiko: EKO de UEA

## **102-a Universala Kongreso de Esperanto**

Seulo, Korea Respubliko, 22 – 29 julio 2017

### **Baldaŭas la limo por la unua kongresa aliĝperiodo**

Ĝis la **31-a de decembro 2016** validas jenaj kotizoj (interkrampe tiuj por la landoj de tarifo B):

- Individua Membro de UEA (sed ne MG) € 180,00 (135,00);
- MG-membro aŭ ne-IM de UEA € 225,00 (170,00);
- Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo IM de UEA € 90,00 (65,00);
- Kunulo/junulo/handikapulo ne-IM de UEA € 135,00 (100,00).

Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1996 aliĝas senpage (bv. kunsendi kopion de lia/ŝia identigilo). Pagmanieroj troviĝas en la aliĝilo, Jarlibro 2016 (p.35-36) kaj en la TTT-ejo.

La analogia limdato por la Internacia Infana Kongreseto estas la 31a de januaro kaj por la 50a Konferenco de ILEI la 31a de marto 2017 – sed aliĝoj ĝis la jarfino ja altiras aparte avantaĝajn kotiojn. Vidu ĉe: <http://www.ilei.info/konferenco/2017/Aligxilo2017papera.pdf> kaj <http://www.ilei.info/agado/Busan2017.php>

### **Aliĝilo por UK**

Papera aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe UEA, kiu volonte liveros ĝin grandkvante por distribuado kun E-gazetoj kaj en E-aranĝoj. La retan aliĝilon eblas ankaŭ elŝuti ĉe la kongresa TTT-ejo aŭ uzi ĝin tie:

<http://www.uea.org/kongresoj>

### **Pliaj kontaktoj**

[kongresoj@co.uea.org](mailto:kongresoj@co.uea.org). La retpaĝo de LKK estas <http://www.2017uk.net/> (la

submenueroj elekteblas el la supra trabo ĉe UK-2017). Krome LKK havas paĝojn pri la UK ankaŭ en la reta komunumo Facebook kun fotoj kaj ĝeneralaj informoj pri la kongreso



<https://www.facebook.com/uk2017seulo>. Por aliĝoj kaj mendoj servas la ĝenerala kongresa retejo de UEA (vd. supre).

### **Kongresejo, kongresa temo, aliĝado**

La kongresejo estos en la Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj (HUFS): 107, Imun-ro, Dongdaemun-gu, Seoul. La temo de la 102-a UK estas ‘Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo’. Ĝis la 19-a de decembro estis registritaj 241 aliĝintoj el 42 landoj.

### **Ĉefdelegitoj, Landaj Asocioj, Lokaj Societoj!**

La Unua Bulteno estas senpage havebla ĉe UEA, ankaŭ grandkvante.

### **La tuta komuniko**

La teksto de la unua Kongresa Komuniko estas alkroĉita. Ĝi donas bazajn informojn pri loĝigo, ekskursoj, la Kongresa Universitato kaj pri vojaĝebloj al Koreio (Azio komencas havi buĝet-flugkompaniojn!).



### **Nia oficiala revuo en 2017**

La januara numero hieraŭ transiris al enpaŝigado, cele al aperigo kiel eble plej frue en la nova jaro. La limdato por la feburara numero estas la 15a de februaro kaj por la marta la 10an de februaro. Ĝis solvoj ĉe la oficiala adreso, sendu kontribuojn al la persona retadreso de la aganta redaktoro: <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>

Vortoj: 375

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: [http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado\\_kun\\_LA,\\_FA...](http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...)

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.